

Thomas Moore,  
La lasta rozo de somero

*tradukita de N. N. 101*

Nun floras de l'somero la sola lasta rozo.  
La kunvivantoj ĝiaj velkis en mortripozo:  
ne estas flor' parenca, aŭ rozburgono ia,  
Por ĝemojn kaj ruĝiĝojn redoni al alia.

Mi ne vin lasos sole, sur la tronket' plendeti  
Ĉar la beluloj dormas, vi devas kundormeti.  
En morto, sen parfumo, l'amikoj jam dormetas:  
Do floron vian teren ĝentile mi disjetas.

Mi tiel volus sekvi se l'amikec' finiĝus  
Aŭ la juveloj brilaj de l'amular' foriĝus:  
Ĉar se la koroj veraĵ kaj dolĉaĵ ne plu estus,  
En la dezerta mondo volonte kiu restus?

*Traduko de la Angla poemo "T is the Last Rose of Summer" de THOMAS MOORE (\*1779-05-28 - †1852-02-25) en Esperanton de N. N. 101.*

*Arg-530-2211 (2014-11-03 22:41:14)*

*Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas en <http://www.gutenberg.org/files/38240/38240-h/vol1/e01.htm>.*

Thomas Moore,  
'T is the Last Rose of Summer

'T is the last rose of summer left blooming alone;  
All her lovely companions are faded and gone;  
No flower of her kindred, no rosebud is nigh,  
To reflect back her blushes, to give sigh for sigh.

I'll not leave thee, thou lone one! To pine on the stem;  
Since the lovely are sleeping, go sleep thou with them.  
Thus kindly I scatter thy leaves o'er the bed,  
Where thy mates of the garden lie scentless and dead.

So soon may I follow when friendships decay,  
And from Love's shining circle the gems drop away.  
When true hearts lie wither'd and fond ones are flown,  
Oh! who would inhabit this bleak world alone?

*Verkinto de tiu ĉi Angla poemo estas THOMAS MOORE (\*1779-05-28 - †1852-02-25).*

*Arg-530-1053 (2014-11-04 07:57:07)*

*Mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun poemon el la retejo <http://www.franks.org/fr01066.htm>. Pri la verkinto, la irlanda poeto Thomas Moore, vidu la wikipedian retejon [http://en.wikipedia.org/wiki/Thomas\\_Moore](http://en.wikipedia.org/wiki/Thomas_Moore).*